n-ro 39

januaro 1993

ISSN 0941-9306

Kiel fari internaciajn pagojn en Esperantujo ?

Ofte oni plendas pri la altaj bankkostoj por pagoj de kotizoj, libroj, k.t.p. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj poŝtĝirsistemo funkciis senpage. Tamen ankaŭ tiu servo iom post iom iĝas pagenda; ĝi cetere ne ĉie ekzistas.

Alia, ĝis nun senpaga ebleco, estas la kurantaj kontoj ĉe Universala Esperanto-Asocio kaj Flandra Esperanto-Ligo. Se vi deponas sumon ĉe unu el tiuj asocioj, la mono estas disponebla por viaj pagoj al plejparto de la E-movado.

Uzante tian sistemon, ne forgesu ankaŭ rekte informi la ricevonton de la pago, ĉar la UEA- kaj FEL-konteltiroj ne estas tre detalaj !

RR

Limdato por LM 40 estas komenco de aprilo !

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Enhavo

La Triesta recepto . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . 4
Donacoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
Nekrologo: Cesar Vanbiervliet . . . . . . . . . . . . . 8
Fremdaj lingvoj en etaj kaj mezaj entreprenoj . . . . . . 9
Esperanto-domo en Nice . . . . . . . . . . . . . . . . 9
Novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
Identecŝildaro 1993 . . . . . . . . . . . . . . . . . 11-12

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-W-7580 Bühl 16, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono: +32.(0)50.330004.

Redaktora sidejo: ĉe s-ro Daniel König, Schwarzwaldstr. 47, D-W-6800 Mannheim 1, Germanio - provizore por la aprila numero: Roland Rotsaert.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))))Q

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: ĉe UEA kaj FEL, kodo ikef-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

Perantoj:

Cinio: S-ro Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-W-7580 Bühl 16
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hispanio: S-ro Pedro Antonio Macanás Valverde, Av. Libertad, 6-2,
E-30009 Murcia (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Coderníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1.250 ptas.)

Hungario: D-ro István Gether, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro Seikô Yamasaki, 185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 6-253232, kotizo 1400 enoj)

Pollando: S-ro Maciej Piegat, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

Jugoslavio: S-ro Sotir Taleski, ul. 'Oslo' br. 12, YU-91000 Skopje

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Togolando: S-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## La Triesta recepto

Post la falo de la fera kurteno en Eŭropo rekontaktiĝas du grandaj amasoj da gentoj. Ne estas tute hazarde ke en Triesto, renkontiĝ-punkto de okcidenta kaj orienta Eŭropo, ekis serio da iniciatoj de grandaj komercaj firmaoj. Naskiĝis, post longa preparlaboro de la Triestaj esperantistoj ĉe italaj industriistoj, la projekto EKA (Esperanto Komerca Agado).

EKA celas, pli ol krei novajn peresperantajn komercistojn, helpi la iniciatojn de jamaj profesiuloj. La novaj malgrandaj firmaoj en orienta Eŭropo ne disponas je la strukturo de la grandaj ŝtataj kompanioj kiuj antaŭe mastris la internaciajn komercajn rilatojn. Sekve, celo de EKA estas helpi al tiuj etaj entreprenoj per merkato-esplorado, kontaktoj kun eblaj liverantoj kaj klientoj, kunordigado de vendej-ĉena distribuado, lokaj leĝoj, doganreguloj, k.s.

Kvankam bremsata de la milito en eksa Jugoslavio jam ĉe la unuaj paŝoj, la afero de tago al tago progresas. Jam nun, pro la intensa aktivado de EKA (C.P 485, I-34100 TRIESTE, Italio), la "eksteruloj" ricevas pozitivan bildon pri la rolo de Esperanto en la praktikaj sferoj de la vivo.

(resumita el revuo Esperanto, novembro 1992)


CHENGDE (HEBEI), ĈINIO - Junio 1993

La urba registaro okazigos celebran ceremonion okaze de la 290-jara ekzisto de la Chengde-a Sumerumejo.
Krom turismajn aranĝojn oni ankaŭ antaŭvidas komercajn kaj ekonomiajn renkontiĝojn.
Por partopreno aŭ informoj kontaktu s-ron Shang Junyi, P.O. Kesto 88, CN-067000 CHENGDE, Hebei, Ĉinio.


S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Komercaj petoj kaj proponoj

## Bulgario

**MINI MAX BUSINESS - Turismo kaj Komerco**

Vendo de: elektromedicinaj aparatoj; terenoj en Bulgario kaj Usono.
Aĉeto de: terenoj ĝis 2000 m2 en okcidentaj landoj.
Turismo: ripozo ĉe Nigra Maro (Ahtopol) kaj en monto Vitoŝa (proksime de Sofio); ekskursoj al Istanbulo.
Dipl.Inĝ. Genĉo Cokanov, (IKEF-membro 153)
Bl. 16 A, apt. 58, Gen. Stoletov Blvd., BG-1233 SOFIO
Telefakso 00 359-2-885349; telefono 00 359-2-311437

Platoj kaj blokoj el marmoro, granito kaj aliaj ŝtonaĵoj por murtegaĵoj, planko- kaj ŝtuparo-surmetaĵoj, arkitekturaĵoj, tombaj monumentoj, skulptaĵoj. Ĉiuj pecoj tajlitaj laŭ via deziro. Petu oferton de:
Firmao SONIDA, s-ro Radoslav PARAŜKEVOV,
kompl. "Strilbiŝte", bl. 8-E, BG-1408 SOFIA;
tel. 00359 2 580714.

Presado per moderna maŝinaro de ĉiuspecaj reklamoj, broŝuroj, kalendaroj... multkolora kaj bonkvalita.
Eblas krei komunan entreprenon kun eksterlanda firmao.
S-roj Georgi Runevski kaj Emil Savov, Firmao KONTRAST,
str. "Jakov Krajkov" 3, BG-1606 SOFIA, Bulgario.
Fakso +359/2/65-81-87.

Rezervaj elementoj por transportmaŝinoj; perado kun div. eks-sovetaj landoj.
S-ro Valĉko Marinski, M&W, "Iv. Boteva" str. 10,
BG-3000 VRATZA; tel. (092)2-14-09, fakso 2-44-08, tks 33314;
esperante, angle, germane, france, ruse, hispane.
Oficiala subvencianto de 49a Internacia Junulara Kongreso !

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Ĉeĥoslovakio

Instru- kaj testprogramo VYTEST por instruado kaj mem-instruado de geometrio en mezlernejoj por IBM-kongruaj komputiloj (ankaŭ en retoj kia LAN Novell).
Adapto al loka lingvo eblas. Demo-versio havebla.
Inĝ. Vladimir Němec, ATOS s.r.o., Zvolenská 5,
CS-01008 ŽILINA; telefono (089)54135.

## Ĉinio

Agenturoj, interŝanĝo de informoj, turismo, tradukado. Administra helpo por investo je favoraj kondiĉoj en mezo de Ĉinio, ĉe Yangzi-rivero.
Kontaktu s-ron Li Yan,
Foreign Trade Economic Information Service Centre (FTEISC),
17 Jiang Jin Zhong Lu, CN-434000 SASHI, Hubei.

Sinteza kombinato industria GRUPO YEMA povas liveri jenajn servojn: informoj pri ĉina merkato kaj eksportaj varoj; konsultado pri investoj en Ĉinio, aranĝo de komercaj vojaĝoj, agenturoj, importo de malgrandaj teknikaĵoj, kompensa komerco; fondo de kunaj entreprenoj (precipe en regiono de Hainan).
Kontaktu: S-ron XIAO Fujun, Prezidanto de GRUPO YEMA,
No. 485, Binhai Xincun, Haiku, Hainan;
telefono (0898)794561; fakso (0898)797632.

Grupaj aranĝoj por turistoj kaj komercistoj, reciproka reprezentado, varinterŝanĝoj, establo de ĉinaj hoteloj, restoracioj kaj vendejoj ekster Ĉinio, kunlaboro pri alta/nova teknologio, spec. elektronikaĵoj k paramedicinaĵoj.
S-ro Tan Guozhong, Ĝenerala Direktoro,
607 Etaĝdomo pri scienctekniko, Xhinhua placo,
Huimin distrikto, CN-010020 HUHEHOTO;
telefakso 86 (0471) 664477-366-313.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Maklera kaj perada servo, informservo, merkatiga servo, organizo de vizitoj por komercistoj, investantoj, teknikistoj k.a. S-ro HUANG Zheng Su, Anhui-a SIDAI Kompanio,
Liuan lu 26, Box 136, CN-230069 HEFEI (Prov. Anhui).

Informojn pri la "Speciala Ekonomia Zono" de Nanchang volonte donos s-ro Wen Gang, Beijing Donglu 22 Hao,
Sheng Jishi Gonshi, CN-330029 Nanchang, Jiangxi.

Porkomercajn vizitojn al urbo Ningbo volonte aranĝos s-ro Gan Yuezhang, Ningbo-a Administra Buroo por Investa Afero de Eksterlandaj Komercistoj, 5/F, Mayuan Mansion, CN-513010 NINGBO. Ĉina/esperanta broŝuro havebla.

## Hungario

Internacia Vendo-Reto SORTIMENTO (IVERS) invitas vin kunlabori, por multe profiti finance, kaj ankaŭ morale ! Detala priskribo de la projekto, aliĝilo kaj mendilo estas riceveblaj kontraŭ 2 IRK-j. Unika ebleco por utiligo de Esperanto kaj altigo de ĝia prestiĝo !
Adreso: Agentejo SORTIMENTO, (IKEF-membro 127)
Pf. 138, H-6100 Kiskunfélegyháza, Pf. 138, Hungario

## Irano

Perado kun iranaj komercistoj por importo kaj eksporto. Serĉas katalogojn de perpoŝtmendaj kompanioj el tuta mondo (ekzemple pri komputiloj, fotiloj, aŭtopartoj, ilaro, sport-vestaĵoj, k.t.p.) Povas interŝanĝe sendi iranajn komercajn ĵurnalojn.
S-ro M. Rezai Saadat, P.O. Kesto 17185-533, Tehran, Iran.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Italio

Fabrikado de altkvalitaj ŝtipoj por virinŝuoj.
Tarcucci, Pellico 18, I-40062 Molinella (BO), Italio.

## Pollando

Aperigo (eventuale inkl. de traduko) en pola gazetaro de anoncoj de eksterlandaj firmaoj.
S-ro Piotr ŚMIEGEL,
Ul. Bronikowskiego 3m.Z, PL-85426 BYDGOSZCZ.

Importo-eksporto, reklamado, perado, riparo de aŭtomobiloj.
"PULSO", Inĝ. Stanislaw Staszewski, ul. Moniuszki 2,
PL-95-070 ALEKSANDRÓV; telefono/fakso (48) (42) 12.22.18
*** estos en Belgio fine januaro/komenco februaro por serĉi
*** kontaktojn - unua halto en Belgio ĉe s-ino GRELA -
*** tel. 087-880832.

## Rusio

Negoco de diversaj bonkvalitaj konsumvaroj; pago per dolaroj aŭ tra reciproka barterkomerco. Turismaj aranĝoj.
MARAN Stepanov, telefono/fakso (007) (095) 928-8049.
Esperante, angle, ruse.

Teksta procesoro LEKSIKONO estas la plej ofte uzata tekstprilaborilo por IBM-kongruaj komputiloj en Rusio. Nove planata versio kapablas samtempe funkcii en pluraj lingvoj (ekz. ruse, angle, germane, esperante...). Informoj ĉe:
Centro "ESPERANTO-KULTURO-EKOLOGIO", pr. Mira 196-44, 129128 MOSKVO; tel. (7-095)1870222, E-poŝto: shmerl(a)micro.msk.su.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Ukrainio

Turismo, artaĵoj (ekspozicio-vendado), reprezentado, eksporto de ŝafistaj hundidoj.
Dir. M. Lineckij, Kultur-Komerca Centro "Esperanto",
pk. 539/1, UKR-254200, KIEV-200; telefono +7-044-4328777.

## Zairio

Esperanta Internacia Asocio de Deklaristoj en Dogano estis fondita en kadro de Matadia Esperanto Centro. Celoj: traduki internaciajn dogandokumentojn esperanten; enirigi Esperanton en internacian komercon. Kunlaborantoj kaj subtenantoj (unualoke el Eŭropa Komunumo) estas bonvenaj.
Provizora sidejo: B.P. 211, MATADI I, Bas-Zaïre, Zaïre.

## Donacoj

La kasisto kore dankas pro jenaj donacoj:

- Jules Verstraeten (B): 200 BEF
- Germain Pirlot (B): 450 BEF

## Nekrologo

Je la 30a de decembro 1992 forpasis en Kortrijk, 87-jara, s-ro Cesar VANBIERVLIET. Post profesia kariero ĉe la administrado de sia urbo, li kreis la Fondaĵon Vanbiervliet, kiu iĝis unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj.

La Fondaĵo Vanbiervliet estas parto de la urba biblioteko de Kortrijk (adreso: Leiestraat 30, B-8500 KORTRIJK, Belgio). Ĝin prizorgas la urbo kaj la loka Esperanto-grupo.

RR

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

## Esperanto-domo en Nice, Francio

Oni deziras krei Esperanto domon/hotelon ĉe la franca lazura marbordo. Por financi ĝin oni eldonos kuponojn de po 100 francaj frankoj, kiuj rajtigas al unu tranokto en la hotelo. Petu detalan informilon de s-ro Robert Llorens, Nice-Esperanto-Domo, Les Hortensias 2, 121 bis Bd. Napoléon III, F-06200 NICE, Francio. Tel. +33-93-830873.

## Fremdaj lingvoj en etaj kaj mezaj entreprenoj

Laŭ komisio de la germana ministro pri instruado kaj sciencoj estis farita farita analizo de la lingvokono en la germana ekonomiaj medioj.

60 % de la germanoj tute ne parolas fremdan lingvon; la situacio en la najbaraj grandaj landoj estas simila. Ĉe junuloj la lingvokono estas pli bona: du trionoj de la agogrupo 20-28jara deklaris paroli almenaŭ la anglan lingvon.

Grandaj entreprenoj kutime havas sufiĉe da rimedoj por, se necesas, doni kursojn al sia dungitaro. Ĉe malgrandaj entreprenoj ofte jes sentiĝas la bezono, sed la eblecoj mankas aŭ estas nebone konataj.

RR

Sutter, Hannelore, Fremdsprachenbedarf in Klein- und Mittelbetrieben, ĉ. 70 p., 1992, K.H. Bock Verlag, 5340 Bad Honnef 1, ISBN 3-87066-708-7, 9,80 DM.

En la bibliografio aldonita al tiu libro estas menciita la verko Sprachenschranken statt Zollschranken ? de T. Finkenstadt kaj K. Schröder, eld. Stifterverband für die Deutsche Wissenschaft, Essen (?). Ĉu iu konas la adreson de la eldonejo aŭ havas tiun libron ? Se jes, bv. kontakti s-ron Herman DECEUNINCK, Kluisstraat 22, B-1500 HALLE, Belgio.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

<u>Novaj membroj</u>

166. S-ro Stéphane DUPIN, studento,
90 bis, rue Roger Salengro, F-94490 ORMESSON, Francio

167. Oy Mendoservo Ak,
eldonejo kaj komerco de lernomaterialoj,
Kivistöntie, SF-05510 HYVINKÄÄ, Finnlando

168. S-ro João Otávio VEIGA RODRIGUES, ŝtatoficisto,
Rua Santa Catarina No 198, Bom Pastor,
BR-37014-150 VARGINHA (MG), Brazilo

Internacia Studumo pri Turismo kaj Komerco

Bydgoszcz, Pollando

En la lernojaro 1992-1993 la studumon partoprenas pli ol 30 konstantaj gestudentoj. Esperantistoj dezirantaj ĉeesti nur parton de la programo estas ankaŭ bonvenaj ! Semajna partopreno (kun loĝado en Esperanto-hotelo ekde dimanĉo ĝis sabato, manĝado trifoje tage kaj la tuta programo de la semajno) kostas 200 NLG. Aliĝojn bonvolu sendi al la adreso: "Monda Turismo", str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 BYDGOSZCZ, Pollando, fakso (52) 41.51.15. La kotizojn bonvolu pagi al UEA en Rotterdam, por konto "etur-p"; eblas ankaŭ pagi en zlotoj surloke.

La plej bonaj absolventoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Komerco 1992-1993 ricevos premie senpagan partoprenon en la somera kurso ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko aŭ senpagan partoprenon en la 78a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio.

Aliĝojn por la Internacia Studumo pri Turismo kaj Komerco 1993-1994 oni akceptas ĝis la 15a de majo 1993.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

# IKEF-IDENTECŜILDARO

v. ankaŭ je dorsflanko !

(ev. aldonu korektitan adresetikedon)

| | | |
|---|---|---|
| titolo (s-ro, s-ino...) | membronumero | naskiĝjaro |
| nomo (laŭ sinsekvo kutima en via lando - substreku ĉefan parton) | | |
| profesio | | |
| firmao/asocio | | |
| privata adreso<br><br>telefono telefakso | | |
| profesia adreso<br><br>telefono telefakso | | |
| aliaj komunikiloj (telekso, teletekso, elektronika poŝto) | | |
| proponataj varoj/servoj | | |
| dezirataj varoj/servoj | | |
| (nur por Germanio) nova poŝtkodo ekde julio 1993: | | |
| rimarkoj | | |

Ni ŝatus pretigi la novan eldonon ĝis junio 1993 (ĉiukaze antaŭ la universala kongreso). La membroj kiuj deziras enesti bonvolu rapide resendi la formularon !

Identecŝildaro estas servo nur por la membroj de IKEF.
Ne forgesu, eventuale, pagi vian kotizon por la nova jaro !

Krucmarku la hoketo(j)n kiu(j) validas:

□ Mi ja estas membro de IKEF, sed mi preferas ne esti en la identecŝildaro.

□ Bonvolu aperigi la donitaĵojn kiuj troviĝas dorsflanke.

□ Mi pagas mian ĉi-jaran kotizon al pĉk de IKEF / al peranto / al ...

□ Mi ne jam estis membro de IKEF, sed mi nun aliĝas. Mi pagas la jaran kotizon (je 400 belgaj frankoj, 20 germanaj markoj, 10 usonoj dolaroj, aŭ egalvaloro) al
□ la IKEF-pĉk. Bruselo 000-1592629-83
□ konto "ikef-c" ĉe □ UEA □ Flandra Esperanto-Ligo
□ peranto .........

| |
|---|
| La IKEF-estraro jam delonge serĉas pli taŭgan nomon por la "identecŝildaro". Ĉu eble vi havas ideon ? |

Resendu la formularon al: Roland ROTSAERT
Visspaanstraat 97
B-8000 BRUGGE, Belgio

aŭ al vialanda peranto, kiu bonvolos transsendi.